



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj  
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245-BARCELONA

## RAPORTO PRI LA XVI-A. KATALUNA ESPERANTO-KONGRESO

*Vendrell*: 4, 5, 6, de junio 1933.

Malfacile estas detale priskribi kaj ĝuste sentigi al niaj legantoj la elvivitajn tagojn de nia kongreso en Vendrell. Nur tiuj, kiuj ĉeestis povos taksu la valoron de niaj kunvenoj kaj festoj, la entuziasmon regantan dum tri tagoj, la optimismon revekiĝintan kaj la nevenkeblan humoron, kiuj en la lasta momento ĉiam respegulas la intiman kontentecon de la partoprenantoj pro la tuta plensukcesinta kongresaranĝo.

La okazigo de niaj katalunaj esperanto-kongresoj ne nur alportas profiton por la lokoj kie ili okazas, oficiala subteno, starigo de grupo, regulaj e-kursoj, k. t. p., sed ankaŭ la cetera samideanaro konstatas la bonan efikon de kelkaj decidoj alprenitaj dum la laboraj kunsidoj de nia nacia esperanto-organizaĵo: la kara K. E. F. La baldaŭa apero de esperanto-gramatiko en kataluna lingvo, la aranĝo de 6 novaj Cseh-kursoj gviditaj de F-ino. E. Pähn, la okazigo de Universala Esperanto-Kongreso en Barcelona, la venontaj Floraj Ludoj kaj Kongreso en la urbo Ripoll, kaj aliaj ne tiom gravaj decidoj estis alprenitaj en la daŭro de la kunsidoj de K. E. F. Jen per malmultaj vortoj



kaj en rezuma formo la taskon faritan en nia lasta kongreso, tasko, kiu por si mem bezonos la helpon kaj kunlaboron de ĉiuj fervoraj esperantistoj, kvankam kelkaj ankoraŭ pretendos diskonigi, ke nia Federacio nenion efektivan faras pro sia *etburĝa*, laŭ unuj, aŭ *naciema*, agado, laŭ aliaj. Tamen, Kataluna Esperantista Federacio daŭrigas sian ekzistadon de post 23 jaroj, malgraŭ la plej malfavoraj cirkonstancoj por libere disvolvi sian difinitan taskon, malgraŭ la neniam atingita oficiala monsubteno. Ĉiuj-ĉi mankojn kaj bezonojn transsaltis nia organizaĵo dank' al la obstinemo kaj fervoro de kelkaj samideanoj, oferemo kaj kunlaboro de aliaj, kiuj kune kaj en la daŭro de kelkaj periodoj eltenis la pezan konstruaĵon, kiu estas konstruita per la komuna agado de multaj katalunaj pioniroj. Ni volas tie ĉi publike danki ĉiujn niajn kunlaborantojn, kies sola manko estas ilia troa modesteco kaj silenta agado. Al niaj delegitoj en diversaj urboj kaj vilaĝoj, al la protektantoj "Amics de Kataluna Esperantisto", al la diversaj samideanoj kiuj zorgis pri la aranĝo de Cseh-kursoj en iliaj propraj urboj, al la juĝantaro de la ĵus okazintaj Floraj Ludoj, kaj fine al la organiza komitato de Vendrell, kies merita laboro tiom sukcesigis nian Kongreson. Al ĉiuj ni sendu varman saluton kaj sinceran gratulon por ke ilia helpo venu regule al ni por la plej bona kaj efika antaŭenpuŝo de Esperanto en nia lando.

## ANTAŬ LA KONGRESO

Unu tagon antaŭ la Kongreso kelkaj samideanoj, inter ili du KEF—komitatanoj, veturis al Vendrell. Ni tuj povis konstati la entuziasmon, tie regantan por la Kongreso kaj por la Internaciaj Floraj Ludoj, la ĉefa festo dum la kongresaj tagoj. Esperanto altiris la atenton kaj simpatian de ĉiuj loĝantoj, kaj rekrutigis novajn batalantojn por siaj pacaj taĉmentoj. Ĉion ni ŝuldas al la lerta agado de la tieaj anoj de la grupo "Frateco", kiuj konstante propagandis sur la lokaj ĵurnaloj pri la Kongreso, e-movado eksterlande, e-kursoj, k. t. p.

En Vendrell dum multaj jaroj regule okazis e-kurso dank' al la senlaca s-anino. F-ino. Maria Julivert, sed kelkajn monatojn antaŭ la Kongreso la e-kursoj plinombriĝis kaj tiom sukcesis, ke oni decidis venigi la Cseh-profesorinon F-inon. E. Pähn, kiu en la lastaj semajnoj antaŭ la okazigo de la Kongreso gvidis Ĉe-kurson



antaŭ 72 partoprenantoj. Ĉio-ĉi, la esperantemo de la loka ĵurnalo "El Baix Penedés", la kunlaboro de la kulturaj societoj, la subteno de la aŭtoritatuloj kaj la sindonemo de la Vendrellanoj donis al niaj festoj kion ili vere havis: SUKCESON.

## DIMANCO, 4

### ALVENO DE LA KONGRESANOJ

La vagonaro kiu alportos la plej grandan nombron de kongresanoj alvenos je la 10'50, sed multajn minutojn antaŭ ĝia alveno atendas sur homplena perono de la stacidomo multaj esperantistoj el Vendrell, ĉiuj membroj de la Organiza Komitato, e-kursanoj kun ilia instruistino F.ino. Pähn, kelkaj barcelonanoj kiuj estis jam alvenintaj, kaj multaj kaj multaj Vendrellanoj dezirantaj salutakcepti la alveturontan kongresanaron. Ĉe la brustoj de la plej multaj pendas jam la bela kongresinsigno.

Je la 10'50 precize oni ekvidas la oficialan vagonaron, kies lokomotivo eligas en tiu momento tondran fajfon, kiu ŝajnas montri ian fierecon pro la respektinda eltrenata ŝarĝo. Okazas en la perono rapidaj kaj senpaciencaj movoj. Tuj super la kapoj eka-peras du belaj esperantaj standardoj kiuj klinsalutas tien kaj reen, dum ili proksimiĝas al la loko el kie venas la vagonaro, prenante kun si parton de la atendantoj.

La vagonaro kuŝas antaŭ niaj nazoj kaj ankoraŭ oni aŭdas aplaŭdojn kaj vivukriojn. Ni komencas vidi kaj saluti malnovajn amikojn, delonge neviditajn; dume, novaj ĵusalvenintaj flagoj staras sur la perono inter la pliapleksiĝinta homamaso. Iom post iom ĉiuj alpaŝas sur la straton kaj oni iras demonstracie tra bela promenejo al la urbodomo, kie okazos la

### OFICIALA AKCEPTO

La kongresanaron atendas la Aŭtoritatuloj ĉe la Salono de la Urbodomo. Eksidiĝas ĉe la prezidejo la Urbestro de Vendrell, Sro. Francisc Arbós, la poliestro de Tarragona, urbkonsilantoj Sroj. Emili Lleó, Angel Martorell, Bonaventura Company, Joan Ivern, la sekretario de la Urbestro, la Organiza Komitato de la Kongreso, la Komitato de K. E. F. kaj diversaj reprezentantoj de lokaj kultursocietoj.

La Urbestro ekstariĝas meze de granda emocio kaj silento estiĝintaj en la tuta salono. Li varme salutas la kongresanojn venintajn al la urbo kiun li reprezentas, kaj je ĝia nomo dankas pro la honoro gastigi dum kelkaj tagoj ilin, propagandistojn de tiu nobla idealo pro kiu —li diras— vi tiom imitinde agitiĝas. Sro. Delfí Dalmau respondas la saluton de la Urbestro kaj dankas



la gastamecon montritan, pri kiu la nelokaj esperantistoj devos diri, ke ĝi estis lojala kaj sincera. Sro. Dalmau faras mallongan skizon, pri la ekzistado de K. E. F. dum la pasinta diktatoreca epoko, el kiu ni nur ricevis, pro tiu nobla idealo kiun vi aludis, persekuton kaj naŭzigan ordon.

Vigla aplaŭdado sonis ĉe la fino de ambaŭ paroladoj, kaj dum la Aŭtoritatuloj forlasas la salonon oni transiras al la

### MALFERMA KUNSIDO

La prezidon okupas nun la prezidanto de K. E. F., Sro. Sebastia Alberich Jofré, kiu stariĝis kaj faras interesan paroladon en esperanto. Li priskribas per elokventaj paroloj la aktualan situacion de la e-movado en Katalunujo, kiu estas tro multe dividita pro ne bone klarigeblaj kaŭzoj, kaj li rekomendas al ĉiuj labori por plisolidigi niajn vicojn, el kio ni eltiros pli efektivan kaj praktikan rezultaton por atingi subtenon de la nova kataluna ŝtato. Aproba aplaŭdado sekvis la entuziasman paroladon de nia Prezidanto.

Sro. Francisc Guitart, prezidanto de la Organiza Komitato, montris per sinceraj vortoj sian ĝojon saluti kaj bonveni la kongresanojn je la nomo de la Organiza Komitato kaj ceteraj samideanoj el Vendrell. Li faras malgrandan historion pri la e-movado en Vendrell kaj aludas la viglan movadon nun estiĝintan dank' al la organizo de diversaj kursoj, el kiuj atingis grandan sukceson la Ĉe-kurso. Li finas sian paroladon kun la espero, ke la Kongreso kiun la Vendrellanoj organizis, akceligos la definitivon plifirmigon de la movado en Katalunujo, pro kio ni —li findiras— eterne ĝojos. La lastaj paroloj de Sro. Guitart dronas en forta aplaŭdado.

La Kongreson tuj salutas la jenaj delegitoj aŭ reprezentantoj per fluaj salutparoladoj en esperanto.

Sro. M. Rodellar el "Badalona Esperantisto" (Badalona); Sro. S. Chaler el "Lumon" (Tarrassa); Sro. J. Marcè el "Frateco" (Vendrell); Sro. J. Comella el "Grup Esperantista" (Vic); Sro. J. Comes el "Bela Espero" (Manresa); Sro. Gili el "Barcelona Stelo" (Barcelona); Sro. P. Casanellas el "Paco kaj Amo" (Barcelona); Sro. J. Vilà el "Ĝerona Espero" (Girona); Sro. R. Gisbert el "Juneco" (Barcelona); Sro. J. Banet el "Nova Sento" (Barcelona); Sro. A. Coll el "Barcelona Esperantisto" (Barcelona); Sro. E. Capdevila nome de "Hispana Esperantista Konfederacio" (Saragossa); Sro. J. M. Coll nome de "Hispana Ligo de Esperantistaj Fervojistoj" (Madrid); F-ino. E. Pähn nome de la estonaj esperantistoj; Sro. J. Grau, L. K., nome de la Lingva Komitato.

Plie, aliĝis aŭ salutis la Kongreson per telegramo aŭ letero



la jenaj Aŭtoritatuloj, samideanoj kaj societoj: la instru-konsilanto de la kataluna registaro, Sro. Ventura Gassol; la kataluna deputito, Sro. F. Farreras Duran; "Flandra Ligo Esperantista" (Antwerpen): "Grupo Laborista Esperantista" (València); "Esperanta Pirenea Stelo" (Montrejean); "Heroldo de Esperanto" (Köln); Pastro J. Casanovas kaj F-ino. C. Maymí (Girona); S-inoj. E. M. Osmond kaj I. Smith (London); nia amiko F. Soler Valls, nuntempe Telegrafestro de Madrido, Al ĉiuj plej korean dankon!

### ESPERANTA ESKPOZICIO

Ĝi okazis en vasta ĉambro de "Centre Industrial". La aranĝo de tiu Ekspozicio estis vere interesa por la neesperantista publiko, kiu dum multaj tagoj povis viziti ĝin. La esperantistojn tre frapis la montrado de aŭtografo de nia plorata Majstro adresita al loka pioniro.

### FESTO DE LA XV-AJ. INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Posttagmeze okazis nia brila festo, kies scenejo estis la vasta Teatro Tivoli, kiu aperis plenplena de publiko antaŭ la horo fiksita por la okazigo de la Floraj Ludoj. Feliĉe la kongresanoj povis okupi la parteron, kiun saĝe oni rezervis por ili. La loĝiojn okupas la reprezentantoj de la lokaj kultursocietoj, donacintoj de premioj por la Floraj Ludoj kaj familianoj de la aŭtoritatuloj. Oni tuj rimarkas la elegante vestitajn fraŭlinojn, kies belecon akompanas la belaj kaj diverskoloraj vestaĵoj. Ĉio havas la adekvatan pompon por la festo. La scenejo imitas florgardenon per mirindaj kulisoj surdesegnitaj per graciaj kaj laŭvice pendantaj girlandoj. La estradon okupas la majesta trono destinita al la Reĝino de la Festo, kaj ĉe ĝia dekstra kaj maldekstra flankoj etendiĝas la belaj brakseĝoj por la Amaj Korteganinoj. Longa kaj belega tapiŝo trairas la parteron de la teatro, serpentumas gracie la ŝtupareton kiu kunigas la scenejon al la publiko, kaj sterniĝas ĉe la piedoj de la reĝina trono.

Estas la 5-a, la horo fiksita por la festo. Multaj personoj penas sensukcese trovi sidlokon en la teatro kaj devas resti ekstere. Subite eksonas nia esperanta himno. La publiko staras. Aperas ĉe la scenejo la Juĝantaro de la Floraj Ludoj, la Organiza Komitato, la KEF-komitato kaj la Aŭtoritatuloj. Dum la novaj evenintoj okupas la dekstran kaj maldekstran partojn de la scenejo, la publiko akompanas iliajn movojn per forta aplaŭdado, kiu denove aksonas ĉe la fino de la himno.

La urbestro, Sro. Francisc Arbós diras en esperanto la ritan



frazon: "Oni malfermas la Feston". Tuj la Sekretario de la Juĝantaro alpaŝas sian apartan tableton kaj per klara voĉo eklegas la sekvantan raporton:

*Sinjorinoj kaj sinjoroj:*

Granda honoro —kaj granda laboro— estas por la Sekretario de la Internaciaj Floraj Ludoj la tasko tralegi la konkursantajn verkojn kaj starigi projekton de verdikto, kiun la ceteraj membroj de l' Juĝantaro kompletigos per siaj voĉdonoj.

Mi hezitis, antaŭ la akcepto de tiu ĉi posteno, pro la konsidero, ke miaj nunaj okupoj ne permesos al mi dece plenumi mian taskon. Sed en la nuna tempo ĉiu samideano en Katalunujo estas premata de materiaj okupoj kaj spiritaj zorgoj. Kaj memorante la Katalunan proverbon, ke "la plej lacigitaj plenumas ĉiun laboron", mi cedis al la peto de la Estraro de nia kara "Kataluna Esperantista Federacio", kaj akceptis ĉi tiun sekretariecon, ne nur pro la efektiva plezuro partopreni de proksime ĉi tiun brillan poezian feston, sed ankaŭ pro la devo, kies plenumon neniu el ni povas eviti, kontribui unu fojon ankoraŭ al la progreso de la Esperanto-movado kaj al la realigo de entrepreno, kia estas niaj Internaciaj Floraj Ludoj, tiel grava por la pliriĉigo de la Esperanta literaturo.

La poezia festo —en la universala lingvo— estas interrompita de antaŭ kelkaj jaroj —ni ne esploru nun la kaŭzojn de tio—, sed ĝi nun reprenas sian vivon kaj sendube longigos ĝin ĝis la definitiva triumfo de nia lingvo.

Povas servi al ni, katalunaj esperantistoj, kiel kuraĝigo, la fakto ke en la lasta tempo la kataluna lingvo plene triumfis kaj ni vidas ĝin hodiaŭ oficialigita, post ĉiuspecaj "mokoj kaj baroj". Nu, post la libera disvastigo kaj oficialigo de nia *lingvo nacia*, ni laboru por la disvastigo kaj oficialigo de nia *lingvo internacia*.

Kaj ni estu certaj, ke, se la homo estas inteligenta, se la homo estas progresema, Esperanto nepre venkos post longe aŭ post nelonge: tio dependos de la klarvido de l' popoloj, bedaŭrinde nuntempe baraktantaj, ĉe diversaj punktoj de l' mondo, pro mallarĝa vido de la homaj rajtoj kaj bezonoj.

Sed ni venu jam al la poezia kerno de la hodiaŭa solenaĵo.

Ne necesas diri, ke nia amo al la poezio, al la bela literaturo, estas intime alligita al la ideo kaj formo de nia internacia lingvo, al la idealo de universaleco kaj paco.

Tie ĉi estas altaro al la Poezio. Ni ĉiuj kunvenis por dediĉi al ĝi kulton.

*Ĝesinjoroj:*

En la vico de niaj poetoj stariĝis nova heroo, kiu tute inde estas premiita per la Natura Floro. Tiu poeto aperis en la pola



lando, kiu tiom da altaj verkistoj —Zamenhof, Grabowski, Belmont, Kabe kaj aliaj— donis al nia literaturo. Li estas S-ro. ROBERT SWIETOSZEWSKI, el Wyszgrod (Polujo).

Lin reprezentos, ĉar li ne povas persone partopreni la feston, S-ro. Delfi Dalmau.

Li elektis Reĝino de l' Floraj Ludoj belan filinon de tiu ĉi gastama urbo. Ni pretiĝu riverenci antaŭ ŝia majesto kaj aklamu ŝian nomon:

### *Fraŭlino REGINA RIERA*

La reprezentanto de la premiita poeto suriras la scenejon kaj ricevas de manoj de la Urbestro belegan bukedon kun granda floro, kiu tuj altiras ĉies atenton pro sia ekzotikeco. Tiu floro estas nomata "Esterlícies aquàtiques" kaj estas nova pruvo de malavareco de S-ro. Pau Casals, la donacinto.

La reprezentanto de la poeto, la prezidanto de la O. K., la prezidanto de K. E. F., kaj la akompanantoj de la Amaj Korteganinoj forlasas la scenejon por translokiĝi al la loko, kie troviĝas la ĉarma Reĝino de la Festo kaj ŝiaj kunulinoj, kiuj senpacience atendas en proksima domo, ejo de la grupo "Frateco".

Sur la strato, survoje al la Teatro Tívoli, la publiko kompakte staras kaj avidas vidi la ceremonion per kiu oni akompanas la Reĝinon al la scenejo de la Floraj Ludoj.

Post kelkaj minutoj de la foriro de la reprezentanto de la poeto kaj liaj akompanantoj eksonas triumfa marŝo kaj ĉiuj rigardoj sin turnas al la enirejo, tra kie tuj envenas la Reĝino kaj Amaj Korteganinoj de la brako de siaj elegantaj akompanantoj. La ĝojon pro la beleco de tiuj momentoj montras la tondra aplaŭdado de la stariĝinta publiko. Ĉiuj fraŭlinoj, Reĝino kaj kunulinoj, estas vestitaj per blankaj kaj longaj tre bele aranĝitaj vestaĵoj, kiuj gracie sterniĝas sur la tapiŝo kiu kondukas al la trono de la Reĝino. La Reĝino kaj kunulinoj okupis siajn sidlokojn ĉe la scenejo, sed la publiko ankoraŭ aplaŭdas pro la ĝuitaj momentoj de Beleco kaj Poezio. Nur ĉe la ekaŭdo de la voĉo de la Sekretario fariĝas la necesa silento por daŭrigi la interesan raporton de la Sekretario, kiu eklegas jene:

*Bela Reĝino:*

*Ĉarmaj Korteganinoj:*

Ne kun ceremonia parademo, sed el tuta koro mi adresas al vi, ho Reĝino de l' Floraj Ludoj, ho Korteganinoj ŝiaj, la saluton de tiuj, kiuj nun havas la plezuron admiri vian hele radiantan gracion, kaj ankaŭ la saluton de tiuj gefratoj niaj, kiuj el malproksimaj landoj sopiras al vi, sed tamen spirite ĉeestas kaj je viaj piedoj respekte sin klinas.



Aŭtoritatoj, reprezentantoj de l' Popolo:

Civitanoj de la urbo Vendrell:

Esperantistoj:

Jen—mallonga raporto pri la rezultado de l' konkurso. Tiu ĉi alportis novajn ŝtonojn por konstrui la altan domon de la Esperanto-literaturo, kiu iam certe mirigos la mondon, malgraŭ la skeptikeco aŭ indiferenteco de nunaj nekredantoj je la spirito de l' Zamenhofa kreaĵo.

Mi devas rimarkigi, ke nur la du premioj pri traduko el kataluna lingvo estas konkursitaj kaj gajnitaj de katalunoj: ĉiuj ceteraj premiitoj estas alilandaj. Se ni atentis, krom tio dirita, ke ĉiuj membroj de l' Juĝantaro kaj la plej multaj donacintoj de premioj estas katalunaj, ni rajtas aserti ke nia lando, same en la nunaj Floraj Ludoj kiel en la pasintaj, malavare kontribuis al la valorigo de Esperanto kaj sekve nuligas la mezepokan ri-proĉon: "l'avara povertà di Catalogna".

#### ORDINARAJ TEMOJ

#### ORIGINALAJ TEKSTOJ, I: POEMO KANTANTA AMON.

Premio de "Kataluna Esperantista Federacio".

Dek-kvin amaj poemoj estas ricevitaj. El ili, kvin estas aparte rimarkindaj. La premion kaj kune la Naturan Floron la Juĝantaro unuanime aljuĝis al la verko n-ro. 57, titolita: "Nur ami kaj diri la vortojn de l' amo". Ĝi estas naŭstrofa versaĵo, tre inspirita kaj plene korekta, originala de samideano, ĝis nun ne konita de ni, kiu certe fariĝos unu el niaj plej bonaj poetoj. Li estas S-ro. ROBERT SWIETOSZEWSKI, el Wyszgrod (Polujo).

Sro. Delfi Dalmau, reprezentanto de la poeto Sro. Robert Swietoszewski stariĝas kaj bele deklamas la versaĵon:

#### NUR AMI...

*Moto:* Nur ami kaj diri la vortojn de l'amo. (*Maria Baŝkirceva*).

Nur ami kaj diri la vortojn de l' amo!  
Nur ami kaj esti amata!  
Nur diri kaj aŭdi la vortojn el flamo,  
Ĉar koro je flamo malsata.

Nur diri kaj aŭdi la vortojn karesajn,  
Subtilajn, velurajn, muzikajn,  
La vortojn preĝantajn, silentajn, promesajn,  
Sekretajn, misterajn, mistikajn.



Nur ami kaj diri la vortojn aromajn,  
Kolorajn, delirajn, pasiajn,  
La vortojn sentplenajn, elkorajn, nehomajn,  
Dorlotajn, mielajn, radiajn;

La vortojn ĝisnune diritajn nenie,  
Plenplenajn de rava emfazo,  
Igantajn sin senti beate, ebrie,  
En ia fabela ekstazo.

Nur ami kaj pri sia amo ripeti,  
Kaj pri tuta mondo forgesi,  
Nur ami —kaj plue nenion jam peti,  
Nur ami —kaj tion konfesi!

Nur ami! la amon ensorbi, enspiri,  
Nur amon inspiri kaj senti,  
Oferti la amon kaj amon altiri,  
Oferti sin mem, sakramenti.

Ĉar ĉio alia sur ter' kaj ĉielo—  
Sensenca stultajo kaj vano,  
Malvero, mensogo, fiaĵo, malbelo,  
Fikcio kaj fatamorgano!

Krom amo nenio valoron posedas,  
La vivo sen am' estas morto;  
Nur am' unusola la koron obsedas,  
Ĉar amo —feliĉo kaj forto.

Do —ami kaj sole pri Amo paroli!  
Do —ami kaj tion konfesi!  
Nur ardi kaj fajri, kaj bruli, kaj boli,  
Nur ami kaj... kisi, karesi!

Robert SWIETOSZEWSKI

Longan aplaŭdadon meritas la vivantaj strofoj de tiu inspi-  
rita poeto, nova stelo en nia esperanta konstelacio. Ĝiam la  
aplaŭdoj ĉesas, la Sekretario daŭrigas sian raporton.

La unuan mencion meritis paro de versaĵoj n-ro. 41, la unua  
titolita "Ne ĝenu vin", kaj al ĝi oni aljuĝis samtempe la Ekste-  
rordinaran Premion n-ro. 1, de S-ro. Prezidanto de "Kataluna  
Esperantista Federacio". Aŭtoro: S-ro. NIKOLAJS KURZENS,  
el Riga (Latvujo).



La duan mencion kaj samtempe la Eksterordinaran Premion n-ro. 2, de la Estraro de "Kataluna Esperantista Federacio", oni aljuĝis al la konkursaĵo n-ro. 5, konsistanta el tri majstraj poemoj "Rememore", "Kristnasko" kaj "Kanto". Aŭtoro: S-ro. JUUL KARNAS, el Antwerpen (Belgujo).

Trian mencion kaj samtempe la Eksterordinaran Premion n-ro. 12, de Pastro Joan Guilera, ĉefparohestro de Vendrell, ni aljuĝis al la konkursaĵo n-ro. 70, konsistanta el kvin poemoj, bele verkitaj kaj kun tre pasia enhavo. Aŭtoro: S-ro. S. S. MIĤAJLOV, el Leningrad (Sovetio).

Fine la Juĝantaro aljuĝis Kvaran mencion al la verko n-ro. 36, longa poemo titolita "Majaj rememoroj", tre sentoplena. Aŭtoro: "Emba", el Budapest (Hungarujo).

*ORIGINALAJ TEKSTOJ, II: AMA VERKO EN PROZO.* Premio de "Kataluna Esperantista Federacio".

Kvar verkoj alvenis por ĉi tiu temo. Oni premiis la prozajon n-ro. 65, "La eterna amo", kiu disvolvas temon naivan sed allogan. Aŭtoro: S-ro. JAKOBO ŜAPIRO, el Bialystok (Polujo).

*TRADUKITAJ TEKSTOJ, I: TRADUKO DE FRAGMENTO DE LA TRAGEDIO "MAR I CEL",* de la granda poeto kataluna Angel Guimerá. Premio de "Kataluna Esperantista Federacio".

Meritis la premion la verko n-ro. 66, lerta traduko de la kvina sceno de la unua akto. La aŭtoro estas nia fervora samideano S-ro. JAUME HERP SANTMARTI, el Barcelona.

*TRADUKITAJ TEKSTOJ, II: TRADUKO DE FRAGMENTO DE LA DRAMO "TERRA BAIXA",* de la eminenta dramisto Angel Guimerá. Premio de "Kataluna Esperantista Federacio".

Oni aljuĝis la premion al la verko n-ro 64, traduko de la fina sceno de la lasta akto de la konata kataluna dramo. Tiu traduko estas rimarkinde bela kaj fidela. Ĝia aŭtoro estas nia juna kaj agema kunbatalanto S-ro EDUARD CAPDEVILA, el Barcelona.

#### *EKSTERORDINARAJ TEMOJ*

III. "KIEL ONI FARAS BONSTILAN TRADUKON". Premio de "Kataluna Esperantisto".

Nur du verkoj konkuris al ĉi tiu temo, kaj la Juĝantaro malfacile elektis la pli bonan. Fine oni decidis aljuĝi la premion al la verko n-ro. 2. Aŭtorino: F-ino AMALIA NUÑEZ DUBUS, el Pamplona.

Mencion meritas la verko n-ro. 25, tre interesa, sed ne tiom ĝuste pritraktanta la temon. Aŭtorino: Sinjorino Emma L. Osmond, el Ealing (Anglujo).



IV. "STUDO PRI POPOLKANTOJ KAJ POPOLKUTINOJ". Premio de la Grupo "BARCELONA STELO".

Ses tiutemajn konkursaĵojn ni ricevis, el kiuj la plej trafa certe estas la verko n-ro. 67, kiu pritaktas la Estonajn popolkuĵojn kaj estas verkita per tre flua, perfekta stilo. Sekve oni aljuĝas al ĝi la premion. La aŭtorino estas nia estimata Estona samideanino, veninta en Katalunujon por instrui Esperanton laŭ ĉe-metodo, Fraŭlino ELINJO PAHN, el Tartu (Estonio).

La Unuan Mencion kaj samtempe la Eksterordinaran Premion n-ro. 13, de la gazeto "El Baix Penedés", el Vendrell, oni aljuĝis al la verko n-ro. 37, kiu tre interese pritraktas kelkajn el la plej konataj patrujaj kantoj. Aŭtorino: Sinjorino Margarete Polier, el Breslau (Germanujo).

Tria Mencion estas aljuĝita al la verko n-ro. 52, pri "La popola kanto en Japanujo", kiu nur pro sia mallongeco ne atingis pli altan lokon en tiu ĉi konkurso. Aŭtoro: S-ro. S. J. Grenkamp-Kornfeld, el Paris.

VIII. "ETIMOLOGIA KLARICO DE LA DIVERSAJ FORMOJ DE MINIMUME CENT GEOGRAFIAJ NOMOJ DE ĈEFAJ URBOJ". Premio de "DALMAU LICEO", el Barcelona.

La premion ni aljuĝis al la verko n-ro. 50, kiu, pro sia graveco kaj plena pritrakto de la temo, certe meritas ĝin. Aŭtorino: Sinjorino EMMA L. OSMOND, el Ealing (Anglujo).

Unuan Mencion la Juĝantaro aljuĝis al la malpli grava, tamen rimarkinda verko n-ro. 27. Aŭtoro: S-ro. J. Wéleminsky, el Prago (Ĉeĥoslovakujo).

XVI. TEMO LAUVOLA. Premio de S-ro. Josep Aixelá.

Tiun ĉi premion ni aljuĝis al la konkursaĵo n-ro. 47, konsistanta el tri originalaj prozaĵoj, tre interesaj kaj belaj, titolitaj "Diktado", "Edziĝo junaĝa, neniam domaĝa" kaj "La veto". Aŭtoro: S-ro. KARL MINOR, el Hamburg (Germanujo).

XX. "ESPERANTO, GRAVA ILO ĈE LA UNIVERSALIGO DE LA JURO". Premio de S-ro. Carles Maria Garcia Rodrigo, juĝisto de la urbo Vendrell.

La premion meritis, malgraŭ sia mallongeco, la sola verko alveninta por ĉi tiu temo, kiu vere ebligus longan kaj brilan pritraktadon. Aŭtoro: S-ro. HENRIKO GELB, el Varsovio (Polujo).

XXI. "TEMO RELIGIA". Premio de la revuo "ESPERO KATOLIKA".

Ni klasigis por tiu temo nur tri verkojn, kvankam en kelkaj aliaj same pulsas ia "religia" sento, kaj la premion ni aljuĝis al la plej bona, n-ro. 7, titolita "Se vi disfendus la ĉielon kaj malsuprenirus". Aŭtoro: S-ro. JOH. HARTOG, el Baarn (Nederlando).



XXII. TEMO LAUVCLA. Premio de S-ro. Prezidanto de la Organiza Komitato de la XVIa. Kongreso de KEF.

La Juĝantaro aljuĝis la premion al la konkursaĵo n-ro. 75, konsistanta el du originalaj prozaĵoj: "Ludwig van Beethoven" kaj "Sankta Francisko kaj la lupoj". Aŭtorino: Sinjorino MARIA SCHOTTL el Munchen (Germanujo).

XVIII. TEMO LAUVOLA. Premio de "Casa Mumbrú".

Oni aljuĝis ĝin al la verko n-ro. 15, originala poemo titolita "Fluas rivero..." Ĝia aŭtorino estas Fraŭlino AMALIA NUÑEZ DUBUS, el Pamplona.

V. TEMO LAUVOLA. Premio de "Esperantista Societo PACO KAJ AMO".

Ĉi tiun premion la Juĝantaro aljuĝis al la verko n-ro. 60, "La terfendegaĵo", perfekta traduko de unu el la plej karakterizaj paĝoj de la hispana verkisto Pío Baroja. Aŭtoro: S-ro. JOSEPH F. BERGER, el Köln (Germanujo).

VI. TEMO LAUVOLA. Premio de "UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO".

Ĝi estas aljuĝita al la verko n-ro. 11, traduko de prozaĵo "Balado pri la akvomuelejo", de Ludoviko Ziláhy. Aŭtoro: S-ro. SPIERER LASZLO, el Budapest (Hungarujo).

VII. TEMO LAUVOLA. Premio de S-ro. PAU CASALS.

Ĉi tiun premion meritis la konkursaĵo n-ro. 62, konsistanta el du originalaj prozaĵoj tre spiritaj kaj bonstilaj: "Sankta Nikolao volis modernigi" kaj "Monumento al la nekonata Esperantisto". Aŭtoro: S-ro. JOSEPH F. BERGER, el Köln (Germanujo).

IX. TEMO LAUVOLA. Premio de "LITERATURA MONDO".

La premion ni aljuĝis al la konkursaĵo n-ro. 31, konsistanta el kvar bonhumoraj versaĵoj originale verkita: "Tradicio", "Suflikista saĝo", "Stultaĵoj" kaj "La spegulo". Ilia aŭtoro estas S-ro. HECTOR VERMUYTEN, el Antwerpen (Belgujo).

X. TEMO LAUVOLA. Premio de la Redakcio de "LITERATURA MONDO".

Meritis ĝin la konkursaĵo n-ro. 19, konsistanta el kvin originalaj prozaĵoj: "Sunleviĝo", "Miaj revoj", "Du vesperoj", "Tagmezo" kaj "Maro blua", tre korekte kaj kun plena inspiro verkita.

Ili estis verkataj de kelkaj amikinoj dek-du, dek-tri kaj dek-var-jaraj, lernintaj Esperanton pere de Ĉe-metoda kurso gvidita de la konata verkisto Julio Baghy, en Tallinn (Estonio).



XI. TEMO LAUVOLA. Premio de S-ro. JAUME CARNER.

Ĝi estas aljuĝita al la konkursaĵo n-ro. 61, bela traduko de poemo de la germana Hugo von Hofmannsthal "Idilio, laŭ antikva vazobildo: centaŭro kun vundita virino sur la bordo de rivero". Aŭtoro: S-ro. JOSEPH F. BERGER, el Köln (Germanujo).

XIV. TEMO LAUVOLA. Premio de la semajna gazeto "HEROLDO DE ESPERANTO".

Ni aljuĝis ĝin al la verko n-ro. 42, skizo "Pri ĝardeno kaj malliberejo", elirinta el la ora plumo de nia malnova amikino Sinjorino MARIA ELWORTHY-POSENAER, el Antwerpen (Belgujo).

XV. TEMO LAUVOLA. Premio de la Urbestro de Vendrell.

Ni aljuĝis ĝin al la verko n-ro. 13, la plej grava ricevita nunjare, majstra traduko de la kvinakta teatraĵo de Shakespeare "Multa maltrankvilo pri nenio". Aŭtorino: Fraŭlino LOUISE BRIGGS, el Leeds (Anglujo).

XVII. TEMO LAUVOLA. Premio de "Casa Camadas".

Ĝin meritis la verko n-ro. 69, bonega studo pri "La Estona popolpoezio", originale verkita de nia estimata samideanino Fraŭlino ELINJO PAHN, el Tartu (Estonio).

XIX. TEMO LAUVOLA. Premio de "CENTRE INDUSTRIAL".

Ni aljuĝis ĉi tiun premion al la verko n-ro 39, traduko de "Elegio al la milito", de la latina poeto Aulo Albio Tibulo. Aŭtorino: Fraŭlino AMALIA NUÑEZ DUBUS, el Pamplona.

Menciindaj estas ankoraŭ la verkoj: n-ro 68 pri "Estona mitologio", de Fraŭlino Elinjo Pähn; n-ro 55, "Venĝo de urso-patrina", de S-ro Henriko Gelb, el Varsovio (Polujo); kaj eĉ kelkaj, aliaj, kies aŭtoroj ne devas malkuraĝiĝi, sed kontraŭe persisti ĝis kompleta pliboniĝo.

Jen estas, respektindaj gesinjoroj, adorindaj Reĝino kaj akompanantinoj, la laboro plenumita en la nuna jaro de nia jam longe vivanta festo.

Kaj nun, antaŭ ol fini mian raporton la ĉeestantoj alilingvaj permesu ke mi adresu kelkajn vortojn katalune al la progresemaĵoj loĝantoj de tiu ĉi urbo.

#### *Poble del Vendrell:*

Plau-me de dir-vos en la llengua nostra les paraules finals del meu discurs, que tots heu escoltat pacientment i que molts de vosaltres no haveu entès: tal benèvola atenció és una prova que vosaltres i amb vosaltres tot el poble de Catalunya, capiu per-



fectament la transcendència de l'Esperanto i esguardeu amb simpatia la nostra tasca de divulgació de la llengua internacional i, més encara, de l'ideal internacionalista i pacifista.

Potser hi ha en nosaltres una gran dosi de sentimentalisme, car en aquests temps de lluita de totes les idees i de topada de tots els interessos, ens preocupem d'una cosa tan excelsa i—no ens avergonyim de dir-ho—tan utòpica com és l'ideal d'una llengua internacional auxiliar, que tal volta només interessa directament aquelles persones que viuen en un medi d'alta cultura o d'intensa relació.

Però les utopies d'avui són les realitats de demà, i l'Esperanto pot dir-se que és ja una realitat hodierna, puix que, com heu vist, és possible de fer-hi fins i tot literatura, i si gosem enlairar-nos una mica i no ens limitem a les coses que es troben a ran de terra, és perquè tenim el convenciment que en definitiva lluitem per la gran causa de la cultura, de les coses de l'esperit, d'aquelles coses que, com digué el filòsof no es compten, ni es pesen ni es mesuren.

I vosaltres, poble del Vendrell, que en mig de les vostres activitats pràctiques heu excel·lit en la cultura, en l'art, en l'esperitualitat, en tota mena d'ideologies; que heu donat a la nostra terra grans figures en literatura, en música i en política—aquella trilogia d'Angel Guimerà, Pau Casals i Jaume Carner—; vosaltres, Vendrellencs, fills d'aquella raça que uneix el seny a l'ímpetu, no desconeixeu l'alta significació—i àdhuc honor per a la nostra terra—que hi ha en el fet que també a Catalunya arribin les inquietuds de tota mena que commouen el món i que, per dir-ho així, el fan giravoltar; vosaltres hereus de la tradició gloriosa d'un poble ple de liberalitat, participeu també de la moderna finor d'esperit i sou dignes d'aquells genis del nostre naixement i de la nostra renaixença, aquells Ramon Lull i Bonaventura Carles Aribau que somniaren, l'un en la unitat del món, i l'altre en l'efectivitat d'una agermanadora llengua universal com la que prediquen els esperantistes; vosaltres, en una paraula, teniu el bon sentit de no fer-nos befa, no ens titlleu de folls, no us trufeu del nostre idealisme, no feu ironies a base dun esperit *floralesc* que fins a casa nostra té detractors; i nosaltres, els esperantistes, us agraïm de cor el vostre esperit comprensiu i corresponem fortament a la vostra encaixada. He dit.

Jaume GRAU CASAS

Aplaŭdon meritis la Sekretario pro sia bonega raporto, kies lasta parto en kataluna lingvo tiom entuziasmigis la publikon.

Poste, la prezidanto de la XV-aj. Internaciaj Floraj Ludoj, Sro. Artur Domènech Mas, stariĝas kaj legas interesan paroladon, kiun,



pro ĝia longeco hodiaŭ ni ne povas kun bedaŭro aperigi. Ankaŭ liaj prezidantaj vortoj meritis aplaŭdon de la ĉeestantaro.

Fine parolis la prezidanto de K. E. F., Sro. Sebastià Alberich, kiu en kataluna lingvo esprimis la admiron de la esperantistoj por la Vendrell-anoj, pro la intereso montrita al nia afero, kiu tiom forte sukcesis akiri por si novajn batalantojn en tiu gastama urbo. Li finas sian elokventan paroladon per trafa klarigo pri la signifo de Esperanto, la dua lingvo de la konsciaj homoj.

La Urbestro eldiras la tradiciajn vortojn "La Festo estas finita" kaj la Reĝino kune kun la Amaj Korteganinoj forlasas, meze de longa aplaŭdado, la scenejon. Denove sur la strato atendas la eliron de la gekorteganoj de la Amo kaj Poezio multa publiko, kiu, kiel ni, certe restis admirita de la beleco de la Reĝino, F-ino. Regina Riera, kaj de la ceteraj Korteganinoj, Fraŭlinoj Rosalia Vilanova, Quiteria Vives, Regina Vidal, Maria Martorell, Paquita Trillas, Antònia Vives, Carmeta Gené, Rosa Domingo, Maria Grau, Paquita Galofré, Anita Ferrer, Antònia Cumulat, kaj de la ĉarmaj paĝioj, F-ino. Mercè Marcè kaj Adela Sendra. Ĉiuj partoprenintaj la Ĉe-kurson de F-ino. Pähn, kaj tial *junaj* esperantistinoj kun junaj koroj!

## INAUGURO DE ZAMENHOF-STRATO

Post la okazigo de la brila festo de niaj Floraj Ludoj oni sin turnis al la strato "Carrer de la Baixada", kiu estonte estos "Carrer del Dr. Zamenhof".

La kantistaro de la societo "La Lira Vendrellenca" malfermas la solenaĵon per aŭdigo de du kanzonoj. La prezidanto de la O. K., Sro. Francisc Guitart, montras per emociigitaj paroloj la dankemon de la esperantistoj el Vendrell al la lokaj Aŭtoritatoj kaj findiras kelkajn vortojn pri la genia personeco de la Majstro. La urbestro, Sro. Francisc Arbós, diras, ke la inaŭguro de tiu ĉi strato respondas al la aŭtentikaj sentoj kaj ne al la ĝentilaj konsideroj de la Urbestro por la Kongreso ĉar la verko de justeco kaj paco de Dro. Zamenhof meritas la plej grandan atenton kaj altan honoron de la civilizitaj popoloj.

Tuj post tiuj vortoj, la Urbestro prenas pendantan ŝnureton kaj detiras la verdan ŝtofon kiu kovras la marmorplaton kun la nomo de nia Majstro. Forta aplaŭdado kaj vivukrioj sonas en tiu momento.

Sro. Dalmau, en la nomo de la katalunaj esperantistoj, dankas la Aŭtoritatulojn de Vendrell pro la ĵus inaŭgurita strato kun la nomo de unu el la homoj, kiu plej multe laboris por la paco kaj interkompreniĝado de la popoloj. La urbo Vendrell ne nur devas fieri pro la alinomigita strato, sed ankaŭ devas gratuli siajn re-



prezentantojn pro ilia klarvideco kaj kompenemo, kiujn devus imiti ĉiuj kulturamaj Urbestroj.

Denove aplaŭdo sonas, post kiu oni iras al la fino de la strato por ankaŭ tie malkovri la duan stratplaton.

### HONORA BALO

Post la vespermanĝo la kongresanoj estis regalataj de la Organiza Komitato per honora balo kiu brile okazis en la salono de "Centre Industrial". Denove ni povis admiri la belecon kaj elegantecon, ne nur de la fraŭlinoj kiuj prezidis la Feston de la Floraj Ludoj, sed ankaŭ de la ceteraj fraŭlinoj, pri kies dancemo aliaj kongresanoj povus paroli, sed ne la raportanto.

### LUNDO, 6

#### ESPERANTAJ EKZAMENOJ

Je la deka matene okazis la ekzamenoj de profesoreco kaj kapableco. Sidis ĉe la prezida tablo kiel ekzamenontoj, Sro. Jaume Grau Casas, L. K., Sro. Sebastià Alberich, prezidanto de K. E. F. kaj Sro. Delfí Dalmau, delegito de U. E. A. en Barcelona. Meritis la profesorecan diplomon F-ino. Maria Julivert el Vendrell, Sro. Sebastià Chaler el Tarrassa, Sro. Josep Alberich el Barcelona, Pastro Frederic Martí el Colònia Güell kaj Sro. Eduard Capdevila el Barcelona. Gratulon al la novaj diplomitaj esperato-profesoroj!

#### LABORA KUNSIDO

Sub la prezido de Sro. Sebastià Alberich, oni komencas la kunsidon je la 11. matene kun ĉeesto de 80 federacianoj.

La sekretario, Sro. Josep Alberich, legas la protokolon de la antaŭa ĝenerala kunveno, kiu estas aprobata, kaj poste li legas la sekvantan Sekretarian Raporton:

#### KARAJ KUNFEDERACIANOJ:

Venis la momento raporti al vi pri la agado efektivigita de tiu ĉi Direkta Komitato dum unu jaro.

Eble ni ne multon faris kompare al niaj deziroj kaj antaŭplanoj, de kiam ni prenis sur nin la ŝarĝon de la direktado, sed konsiderante ke en la daŭro de unu jaro oni povas nur entrepreni relativan laboron malgraŭ plej granda bonvolemo, mi kredas ke la intertempaj novaj paŝoj atingitaj de nia kara Federacio por ĝia plifirmigo kaj por la antaŭenirigo de la esperanta movado en nia lando, estas sufiĉe kontentigaj kaj indaj, almenaŭ, je via aprobo kaj plaĉo.

Mi ne devas ne menciigi ĉi tie, ke la du antaŭaj komitatoj vere multon faris. Ekzemple ili ebenigis plejparte nian irotan vojon ĉar ili sukcesis malgraŭ ĉiufankaj malfacilaĵoj kaj plej malbona





*Fraŭlino* REGINA RIERA



Reĝino de la XV-aj. Internaciaj Floraj Ludoj





*La Reĝino kaj ŝiaj Amaj Korteganinoj, F-inoj. Rosalia Vilanova, Quitèria Vives, Regina Vidal, Maria Martorell, Paquita Trillas, Antònia Vives, Mercè Marcè, Regina Riera, Adela Sendra, Carmeta Gené, Rosa Domingo, Maria Grau, Paquita Galofré, Anita Ferrer, Antònia Cumulat.*





*Supre:* La scenejo de "Teatre Tívoli" dum la poezia Festo.  
*Malsupre:* Parto de la Esperanta Ekspozicio ĉe "Centre Industrial"





Sinjoro ROBERT SWIETOSZEWSKI

La gajninto de la Natura Floro.



La Organiza Kongresa Komitato de Vendrell



financa situacio, restarigi nian ĉefan enlandan organizadon kaj reaperigi ankaŭ la tradician konatan, nian karan organon "Kataluna Esperantisto". Dank' al tio, mi povas diri ke ni trovis la internan flankon de nia Federacio bone funkcia, pro kio ni povis speciale okupiĝi pri ĝia ekstera flanko kaj pri daŭra propagando de Esperanto ĉe neesperantistaj medioj.

Grandan propagandon pri nia lingvo kaj la nunjara Universala Kongreso en Kolonjo ni faris en Barcelona kaj aliaj urboj de Katalunujo, per la elmontrado en kelkaj kinoj de la Kolonja filmo kun klarigaj tekstoj en Esperanto. Unuamomente prezentigis malfacilaĵoj por enirigi ĝin en nian landon sen doganimpostoj, sed feliĉe ni solvis ĉion dank' al la bonvolema helpo de nia bona amiko kaj samideano Sro. Francisco Azorín, deputito ĉe la Hispana Parlamento.

Kiel iam raportite, vi certe rememoras pri inaŭguro de strato Dro. Zamenhof en Barcelona. Mi ĝojas sciigi vin ke intertempe oni inaŭguris samnomajn stratojn en Vic kaj Cassà de la Selva. La komitato de KEF interkonsentis sendi al ambaŭ urbestroj gratuldankan leteron pro ilia imitinda ekzemplo de honorigo al aŭtoro de Esperanto.

Ni decidis fariĝi pagantaj membroj de la grava entrepreno Internacia Esperanto-Muzeo de Vieno, kies biblioteko enkalkulas jam pli ol 6.000 esperantajn librojn.

En la Universala Kongreso de Parizo, ni nin reprezentigis pere de Sro. Delfí Dalmau, nia konata pioniro, kaj ankaŭ la raportanto partoprenis ĝin. La 2. de septembro Sro. Dalmau raportis pri la Kongreso ĉe "Ateneu Enciclopèdic Popular" antaŭ multnombraj ĉeestantoj. Mi ne povas preterlasi la okazon diri ke ankaŭ ĉi tiun fojon al nia delegito oni malpermesis saluti la kongreson je la nomo de la katalunaj samideanoj. Pri tiu malagraba afero oni jam parolis siatempe sur la paĝoj de "Kataluna Esperantisto" kun alrilataj komentoj kaj tial mi ne ripetos la saman. Tamen, pli malsupre mi devos reiri al tiu punkto.

Tiu ĉi komitato sendis petskribon al la Kataluna Ŝtato "Generalitat de Catalunya" per kiu ni petis ke en la novan studplanon kiun oni starigos por la kreotaj lernejoj, oni enkonduku la studon de Esperanto kiel nedevigan fakon kaj ke oni deklaru ĝian scion atila.

Kaj kion diri pri la granda paŝo farita ĉe Radio? Dank' al niaj klopodoj ni sukcesis fari daŭran uzon de la mikrofono de "Ràdio Associació de Catalunya" ĉiun dusemajnan lundon nokte dum unu kvaronhoro. Oni eĉ iafaje parolis en Esperanto, ekzemple nia estona samideanino F-ino Elinjo Pähn salutis je sia alveno la katalunajn samideanojn. Krom ĉio ĉi, sur eksterordinara numero de "Catalunya Ràdio" ili publikigis la portreton de nia prezidanto kune kun propagandartikolo kaj poste oni invitis lin al oficiala festeno. Pro la bonvolemo elmontrita je nia Federacio kaj Espe-



ranto, ni certe devas esti tre dankemaj al la direktantoj de Ràdio Associació de Catalunya. Ni subtenu, do, niaflanke, iliajn laŭdindajn entreprenojn.

Kun Hispana Esperantista Konfederacio ni kontaktis konstante kaj pagis niajn kotizojn. Al la Delegitara Kunsido kiu okazis la duan de oktobro en Zaragoza, ni sendis nian prezidanton kiel delegiton.

Franca Societo por Propagando de Esperanto proponis al ni aranĝon de internacia karavano al Kolonja Kongreso kun partopreno, krom ili, de la Itala Federacio kaj Hispana Asocio.

Se katalunoj deziras profiti de la karavano, ili povas sin turni al ni por informoj. Vi certe estas informitaj per nia esperanta gazetaro pri la tiel pridiskutita problemo rilate al la nova organizo de la internacia esperanta movado. Post la nuligo en la Pariza Kongreso de la Kontrakto de Helsinki inter Universala Esperanto-Asocio kaj la Naciaj Societoj, tiu projekto pri reorganizo fariĝis pli kaj pli aktuala. Kompreneble, pri tiu grava afero KEF ne povis flanke stari kaj devis kunlabori laŭpove. Intertempe fondiĝis Universala Federacio Esperantista kiu anstataŭas la malnovan organismon Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado kaj kiu sin etendos sur pli vastaj agadkampoj, laŭ ĝia regularo. UFE sendis al ni la protokolon de la Reorganiza Komitato kun ceteraj dokumentoj kaj petis la aliĝon de KEF. Ni pripensis la aferon, post kio, pro ia antaŭvidebla konkurenco kun Universala Esperanto-Asocio, kun kiu ni ĉiam havis tre amikajn interrilatojn, ni povis nur provizore respondi ke ni principe akceptas la regularon de UFE kaj ke proponojn pri ŝanĝoj ni faros ĝustatempe antaŭ la Kongreso de Kolonjo. Tamen, por ekdifini nian situacion en la internacia esperanta movado, ni antaŭinformis ke la demando pri nia aliĝo estas superflua se oni ne konsideras nin kiel Nacian Societon kun plena rajto paroli kiel nacia delegito en la Universalaj Kongresoj kaj Internaciaj Konferencoj. Ni aldonis ke pri tiu afero ni volas havi klaran ideon kaj ke unu fojon por ĉiam ni sciu je kio ni devas nin teni, ĉar nia embarasa situacio ne plu povas nek devas ekzisti. Poste ni diris ke nur la Kongreso de Vendrell rajtos decidi kia devos esti nia definitiva sinteno antaŭ la movado kaj UFE. Al ĉio-ĉi, UFE respondis ke ili konsideras nian organizaĵon kiel memstaran kaj apartan societon kaj ke ili atendas niajn decidojn de Vendrell. La 19. de majo okazis en Genevo kunveno de U. E. A. kaj Naciaj Societoj, kunvokita de UFE. Bedaŭrinde ni ne povis sendi delegiton, sed ni petis la Francan Societon ke ili bonvolu reprezenti nin. Lasthore mi informiĝas ke la Konferenco bone sukcesis kaj ke oni alprenis decidojn cele al unuecigo de la tuta internacia esperanta movado. Ne plu ekzistos dualismoj ĉar ĉiuj organismoj fandiĝos en unu solan. Mankas al mi detaloj, sed mi povas antaŭdiri, ke ŝajne oni alvenis al la tiel dezirata solvo.



Mi nun parolos pri la Ĉe-kursoj, dank' al kiuj ni sukcesis iom revigligi la movadon. Instigite de la laboro plenumita de la antaŭa komitato tiurilate, ni venigis la lertan profesorinon F-inon Elinjo Pähn el Estonujo. Tion ni ŝuldas plejparte al la malgranda kapitalo kiun ni povis starigi dank' al malavaremo de kelkaj samideanoj. De januaro F-ino Pähn troviĝas inter ni kaj donis jam kelkajn kursojn kun rimarkinda sukceso. Sur "Kataluna Esperantisto", precipe sur la numero marto-aprilo, ni raportis pri la bona marŝo de la kursoj. Mi diru nur, ke post tiu de Vendrell, kiu ĵus finiĝis antaŭ la kongreso kun partopreno de 72 lernantoj, estas aranĝita unu en la grupo "Nova Sento" kaj alia en "Ateneu Polytechnicum" de Barcelona. Aliaj sekvos en Girona, Manresa, kaj Tarrassa. Ni volis organizi kurson por instruistoj ĉe "Casal del Mestre" sub la aŭspicoj de la "Generalitat de Catalunya", sed malgraŭ niaj multaj paŝoj kaj klopodoj, ni ne povis sukcesigi la aferon, kvankam komence ni havis la esperon envojigi ĝin. Mi tre bedaŭras tion konfesi al vi kaj precipe al F-ino Elinjo Pähn, kiu kunhelpis nin kaj havis grandan intereson por ĝia efektivigo.

En la lasta Ĝenerala Kunveno oni pritraktis la eblecon organizi en Barcelona la Universalan Kongreson de Esperanto en 1935. S-ro. J. Gili Norta, nuna vicprezidanto de KEF., tiam raportis pri la stato de sia korespondado kun la Direktoro de Internacia Centra Komitato. Laŭ ĝi volonte oni akceptus Barcelona kiel kongresurbon por la jaro 1935, ĉar ne estis alia kandidato. Nu! Ĉiuj ĉeestintoj zorge konsideris la necesajn fortojn por antaŭenirigi similan entreprenon. Ili sugestis ke la eniranta komitato devus reanigi ĉiujn esperantistajn grupojn en Katalunujo, organizi paroladojn, revigligi la movadon, t. e., rekonstrui KEF por ke ĝi fariĝu denove forta kaj laborkapabla kiel antaŭ la diktatora reĝimo. Sekve de tio, ni informis al I. C. K., ke ni firme subtenas la inviton por Universala Kongreso en 1935, sed kun la rezervo sciigi ilin pri la definitiva akcepto post unu jaro. Al tio, I. C. K. respondis ke kiel jam antaŭsciigite al S-ro. Gili, nia invito estas en unua rango. Sed jen, ĉar intertempe Hispana Esperanto-Asocio ankaŭ petis la okazigon de tiu kongreso en Madrid, ni esprimis al I. C. K. plenan submeton al iliaj decidoj. Ni aldonis, ke se por la bono de nia movado estus pli oportune akcepti la inviton de Madrid, ni tre volonte alportus nian helpon al tiu organizaĵo kiu prenos sur sin la organizan taskon. Se la invito de Madrid prosperus, tiam ni volus havi la rajton organizi antaŭ-aŭ postkongreson. Tio donus al ni ankau okazon labori por Esperanto en Katalunujo. Jen kiel staras la afero pri la Universala Kongreso. Cetere, tial ke en la tagordo de la hodiaŭa kunsido estas fiksita tiu punkto, tie ni povos doni ankaŭ pluajn detalojn, kiel ekzemple niaj paŝoj faritaj tiurilate ĉe la diversaj grupoj de Barcelona kaj pioniroj de nia movado en



nia lando. Tiu ĉi kongreso devos decidi, do, ĉu ni volas aŭ ne la Universalan Kongreson en 1935.

Kaj pri la kongreso de Vendrell, nun okazanta, kion mi povas diri al vi, se ĉio ja staras rave antaŭ viaj okuloj. Konforme al viaj kaj niaj deziroj, ni tre streĉis niajn fortojn por reorganizi niajn tradiciajn kongresojn kaj internaciajn florajn ludojn. Jen vi povas konstati kaj tuŝi mem la fruktojn de nia laboro tiusen- ce. Feliĉe ni trovis en Vendrell aron da gesamideanoj, kiuj, instigitaj de ni, riskis preparon de kongreso kaj floraj ludoj, pruvante per tio, la fervoron, kiun ili sentas por Esperanto, kaj sindonemon por nia kara Federacio. Ilin devas danki ĉiu konscia kataluna esperantisto, ĉar per okazigo de ĉi tiu kongreso, la unua post kelkjara interrompo pro kaŭzoj de vi ĉiuj konataj, nia movado refloras, ĝi eniras denove en sian normalan antaŭeniran dis- volviĝadon.

Tro longa fariĝus ĉi tiu raporto, se mi devus ankoraŭ pris- kribi aliajn taskojn plenumitajn de la komitato. Mi diru nur, ke ni faris paroladojn en esperantaj grupoj de Barcelona, Vendrell, Sabadell, Vic, Manresa, k. t. p. Regule ni sendis notojn pri Es- peranto al la ĵurnaloj kaj admonis letere multajn samideanojn labori daŭre por nia afero. Lastatempe la nombro de niaj fede- racianoj kaj abonantoj de nia organo pligrandiĝis kontentige. Kiel fincito estos interese sciigi vin ke la entuziasma ĵus fon- dita grupo de Vic "Esperantista Grupo", same kiel aliaj grupoj ne malpli viglaj, promesis sian aliĝon al KEF.

Jen, estimataj kunfederacianoj, la tasko farita de ĉi tiu ko- mitato dum la jaroj 1932-33. Ni celis multon, sed ni trafis mal- multon. Maro ja estas gutaro.

Josep ALBERICH JOFRE.

Post legado de tiu ĉi Sekretaria Raporto, kiun oni aprobas per aplaŭdo, la kasisto, Sro. Jaume Herp, legas la bilancon 1932-33, laŭ kiu restas en kaso 255'20 pesetoj.

Tuj oni transiras al la Ĝeneralaj Aferoj, kies diskutado donas jenajn decidojn:

Ke la nova eniranta estraro de KEF agu plenlibere ĉe la prok- sima kunveno de delegitoj de Hispana Esperantista Konfедера- cio kiu okazos en Zaragoza. Same oni rajtigas la estraron de KEF por estontaj intertempaj kunvenoj de tiu ĉi organismo.

Oni interkonsentas aliĝi definitive al la nova plilarĝigita Uni- versala Esperanto-Asocio kiu stariĝis sekve de la Konferenco oka- zinta la 19. de majo en Genevo inter Universala Federacio Es- perantista, Universala Esperanto-Asocio kaj la Naciaj Societoj. La aliĝon oni kondiĉis jenmaniere: subteno de la vidpunktoj, kiujn



la komitato de KEF, komunikis al UFE rilate la rajton de naciaj minoritanoj aliĝi sendepende al la nova organizo.

Meze de granda entuziasmo oni decidis akcepti la Universalan Kongreson de Esperanto en 1935, por kio momente oni starigas jenan organizan komitaton: Dro. Torres Carreras, honora prezidanto, Profesoro Delfi Dalmau, prezidanto kaj Sro. Jaume Grau Casas, sekretario.

Laŭ propono de Sro. Chaler, oni eldonos en baldaŭa tempo novajn esperantajn gramatikon kaj vortaron en kataluna lingvo, ĉar antaŭaj lernolibroj kaj vortaroj elĉerpiĝis kaj krome laŭlingve ne konformaj al nunaj tempoj. Por la plenumo de ĉi tiu granda kaj grava tasko, cele al pli granda antaŭenpuŝo de la movado en nia lando, oni elektas Sron. Jaume Grau Casas, kies altvaloran kompetecon neniu pridubas.

Proponite de Sro. Dalmau, ĉiuj ĉeestantoj esprimas per tondra aplaŭdado sian ĝojon kaj dankemon al la Loka Kongresa Komitato pro la bona organizo kaj disvolviĝo de la festoj de nia Kongreso.

Oni fermas la kunsidon je la unua posttagmeze.

## OFICIALA FESTENO

En granda ĉambro de "Hotel del Centre" okazis je la tria la Festeno de la Kongreso. La Reĝino kaj ŝiaj Korteganinoj sidas ĉe la prezida loko de la longa tablo, kium okupas 60 personoj. Apud la Reĝino sidas la reprezentanto de la laŭreata poeto kaj la Urbestro de Vendrell. La ceterajn Korteganinojn akompanas la membroj de la O. K. kaj K. E. F. La menuo konsistis el kelkaj tre bone preparitaj pladoj. Ĉe la momento malŝtopi la ĉampanon, la prezidanto de la O. K., Sro. Guitart, dediĉas sian toston al la Reĝino de la Festo, al la Aŭtoritatuloj kaj al la propagandistoj de Esperanto, kies antaŭenpuŝon en Katalunujo li forte deziras por la plej brila okazigo de la Universala Kongreso en Barcelona. La Urbestro diras, ke de post kiam li estas la reprezentanto de Vendrell ankoraŭ li ne sentis sin tiom emocie kiel nun, pro la ĉarmo de la festo kaj simpatio de la ĉeestantoj.

La reprezentanto de la gajninto de la Natura Floro, Sro. Delfi Dalmau, tostas al la Reĝino kaj al la beleco de ŝiaj Korteganinoj kaj parolas pri siaj klopodoj enirigi Esperanton ĉe intelektaj medioj. Longa aplaŭdado eksonas kiam la Reĝino stariĝas kaj per emociigita voĉo dankas ĉies ĝentilaĵojn. Sro. Jaume Grau, L. K., faras interesan paroladon, kiu estas plena de entuziasmo por Esperanto, kaj li esperas, ke la *dua* lingvo venkos en baldaŭa tempo. Sro. Joan Gili, vicprezidanto de K. E. F., parolas pri la impresoj ricevitaj en antaŭaj kongresoj, kaj li diras, ke ĉio tre agrable restos en lia memoro. Fine parolas la prezidanto de



K. E. F., Sro. Sebastià Alberich, kiu esprimas sian ĝojon pro la bone sukcesintaj festoj de la Kongreso, pri kiu la esperantistoj bone rememoros dum sia vivo.

Longa aplaŭdo kronas la lastajn vortojn de la Prezidanto.

### FERMA KUNSIDO

Oni malfermas la kunsidon je la kvina posttagmeze, sub la prezido de Sro. Sebastià Alberich.

Sro. Jaume Grau rekomendas ke oni disvastigu la konatan "Ruĝa Broŝuro" ĝis kiam la de li verkota gramatiko estos preta.

Laŭ propono de Sro. Guitart, oni decidas danki la urbestaron de Vendrell pro la subteno kiun ili donis al la Kongreso.

Sro. Comella diras ke oni devas uzi ĉiajn rimedojn por pli-grandigi la liston de abonantoj de Kataluna Esperantisto kaj aldonas ke siavice li sukcesis varbi rimarkindan nombron de abonantoj en sia urbo Vic.

F-ino Maria Julivert proponas kelkajn ŝanĝojn ĉe la enhavo de Kataluna Esperantisto, por ke ĝi fariĝu interesa al novaj varbitoj.

Sro. Eduard Capdevila, redaktoro, promesas iel ajn plenumi la sugestojn faritajn de F-ino Julivert.

Laŭ propono de Sro. Grau, oni esprimas dankemon al Sro. Eduard Capdevila, redaktoro de Kataluna Esperantisto, pro lia meritinda laboro en la redaktado de la gazeto.

Sro. Capdevila eldiras dankon kaj esprimas ke de Sro. Grau li ricevis konstante kunlaboradon.

Oni akceptas proponon de Sro. S. Alberich, laŭ kiu la kongreso decidas aliĝi al la Kataluna Komitato Kontraŭ la Milito.

Kiel kongresurbon por la venonta jaro oni proponas Ripoll. Sroj. Dalmau kaj Comella faros la necesajn paŝojn ĉe la samideanoj de Ripoll.

F-ino Elinjo Pahn esprimas sian dankon al la Komitato de KEF., por la konstanta subteno kiun ŝi ricevis de sia alveno en Katalunujo por doni kursojn laŭ la sistemo Ĉe.

Estas elektata jena estraro por 1933-34: Prezidanto, S. Alberich Jofrè; vicprezidanto, Joan Gili Norta; sekretario, Eduard Capdevila; vicsekretario, Rafael Gisbert; kasisto, Jaume Herp; kalkulisto, Manuel Rodellar; bibliotekisto, Josep Alberich; voĉdonantoj, Ramon Soler kaj Josep Banet.

Oni fermas la kunsidon je la 18.30 per komuna kantado de nia himno.

### PRELEGO DE F-INO. ELINJO PAHN PRI ESTONIO

Tiu interesa prelego okazis en la salono de "La Lira Vendrellenca" antaŭ multa publiko. La konata Ĉe-instruistino bone



kaj interese disertaciis pri sia hejmlando, kies originon, historion kaj literaturon ŝi mirinde rezumis en la daŭro de unu horo kaj duono. Ĉe la fino, la publiko atente aŭskultis kelkajn diskojn kun estonaj popolkantoj.

## LUNDO, 5

### EKSKURSO AL SANTES CREUS KAJ POBLET

Du grandajn omnibusojn okupis la kongresanoj kiuj ekskursis por la tuta tago al la pentrindaj lokoj, kie staras la du famaj kaj vizitindaj monaĥejoj.

Malfacile estas raporti pri la grandiozeco de ambaŭ monaĥejoj, kiuj gardas en siaj monumentaj tomboj mortintajn korpojn de la iamaj katalunaj reĝoj. Viziti tiujn lokojn estas duonkonatiĝi kun la historio de Katalunujo.

Oni tagmanĝis en bele situita hotelo el Espluga del Francolí. Poste regis gajeco kaj bonhumoro inter la ekskursantoj, kiuj je la kvara ekveturis al Vendrell tra malsama vojo.

Kelkajn minutojn antaŭ la 7. oni alvenis al Vendrell kaj tuj ĉiu kongresano prenis sian valizon kaj iris al la stacidomo, kie atendis multaj Vendrell-anoj por adiaŭi la forveturontojn.

La vagonaro proksimiĝas kaj manpremoj, gratuloj, dankoj okazas sur la perono. La vagonaro ekmoviĝas kaj sonas diversaj vivukrioj dum ĉiu agitas sian ĉapelon aŭ poŝtukon. Lastaj "Vivu Vendrell" kaj "Ĝis Ripoll" flosas en la aero kaj perdiĝas inter la bruado de la malproksimiĝanta vagonaro.

Denove en la urbo, en la hejmo, en la *proza* vivado...

## ALIAJ FESTOJ

### *Esperanta Meso*

Lunde okazis, je la naŭa, en la paroĥa preĝejo la anoncita meso kun esperanta prediko, sub la zorgo de pastro Martí Albanel, kiu glosis la citaĵon "Amu vin reciproke" de Sankta Johano Apostolo. Tiu temo disvolviĝis per flujaj kaj fratamaj paroloj de pastro Martí, kiu poste, pro lia interesa prediko, merite ricevis gratulon de multaj samideanoj.

### *Kunveno de Liberpensuloj*

En la sidejo de "La Lira", matene je la deka, okazis la anoncita kunveno de liberpensuloj kun partopreno de dudek-sep gesamideanoj. Okazis viglaj diskutoj inter la diversaj ĉeestantoj kaj oni decidis, ke kun la Kongresoj de KEF. regule okazu la kunveno de la liberpensuloj.



Oni interkonsentis rekomendi al la komitato de la Federacio plenan neŭtralecon ĉe la okazigo de Kongresoj por eviti la kritikon kelkfoje pravan de diversaj samideanoj.

El la diversaj deziresprimoj akceptitaj ni citu la dokumenton adresitan al la kataluna registaro kun la peto ke la laikaj leĝoj estu severe plenumigitaj kaj ke la bapto de senkonsciaj infanoj estu malpermesata. La dokumenton subskribas Joan Serres, Joan Comadran, Pilar Molins, Maria Molins, Delfí Dalmau, Josep Mateu, Manuel Nin, Ramon Giménez, Amadeu Pujol, Jaume Grau Casas, Jaume Mercè, Sebastià Chaler, Ramon Soler, Jaume Pruna, Josep Montseny, Eduard Capdevila, Josep Alberich, Anselm Pi, Ricard Alberich, Josep Pibernat, Pere Casanellas kaj S. Alberich Jofrè.

### *Vermuto de la Okulvitroj*

Tiu vermo ankaŭ okazis lunde, antaŭ la okazigo de la Oficiala Festeno. Laŭ la *regularo* de tiu vermuttrinkado, nur personoj kun okulvitroj povas ĝin partopreni, sed la tradicia ruzemo de kelkaj fraŭlinoj solvis ies mankon. Kelkaj *okulvitroj* el papero ripozis sur multaj nazoj, kaj tial, ke la *regularo* ne parolas pri falsaj okulvitroj, oni devis ilin vole ne-vole akcepti.

### *Amuza Vespero*

Post la fino de la kongresaj taskoj, la multflanka agemo de la kongresanoj improvizis tiun Amuzan Vesperon, kiu konsistis el dancado de la esperanta danco "La Rondo", kiun antaŭ la vespermanĝo estis instruinta al la kongresanoj Sro. Montserrat. Aliaj amuzaj ludoj distris la ĉeestantojn ĝis noktomezo.

## AL ESPERANTAJ REDAKCIOJ KAJ ELDONEJOJ

Pro nesufiĉa loko en la kolonoj de "Kataluna Esperantisto" ni ne povas publikigi laŭ la konvena frua tempo ĉiujn recenzojn de la ĝis nun aperintaj esperanto-libroj. Estas ja tiom multaj!

En la sekvontaj numeroj de KE ni dediĉos pli multajn paĝojn al la Bibliografio, kaj ni esperas, ke ĉiuj aŭtoroj kaj eldonejoj ricevos baldaŭ plenumon de iliaj sendaĵoj.

Jen listo de la aperontaj recenzoj:

VORTOJ DE PROFESORO CART, MR. TOT ACETAS MIL OKULOJN, JANE EYRE, ORIGINALA, VERKARO DE DRO. ZAMENHOF, HISTORIO DE KRISTO, ESTONA ANTOLOGIO, HUNGARA ANTOLOGIO, KIKI, ETERNA BUKEDO, LA VOJO RETURNE, LINGVO-STILO-FORMO, MARKS KAJ ENGELS PRI RELIGIO, LA AMO EN LA



A LA SENYORETA REGINA RIERA, REINA DELS  
JOCES FLORALS ESPERANTISTES DEL VENDRELL  
I A LA SEVA CORT D'AMOR

Regina, que amb la vostra gentilesa  
els nostres Jocs Florals heu presidit:  
admirem i estimem vostra bellesa; ,  
vostre record no el marcarà l'oblit.

I vosaltres, gentils amigues seves,  
que la seva hermosura reflexeu:  
rebeu l'amor de les paraules meves  
i l'homenatge de la meva veu.

Que perduri el record d'aquesta festa  
per sempre al fons de tot del vostre pit,  
i que la joia d'aquest dia resti  
com ram de flors eternament florit.

Jaume GRAU CASAS

(Improvisació durant el banquet.)

JARO DEKMIL, BUDAO, REZULTOJ DE LA UNUA KVIN-  
JARPLANO, KONTRAŬ LA REGANTAJ PERCEPTOJ DE  
KRIMO KAJ PUNO, ĈINAJ NOVELOJ, WORTERBUCH  
DEUSTCH - ESPERANTO, WORTERBUCH ESPERANTO-  
DEUSTCH, DUDEK-KVARA UNIVERSALA KONGRESO DE  
ESPERANTO, VOCABULARI FRANCÈS-CATALÀ DEL CURS  
DE CONVERSACIÓ LINGUAPHONE FRANCÈS, LA UNUA  
SUPLEMENTA LEGOLIBRO DE ESPERANTO, TRA LA SO-  
VAĜA KAMĈATKO, FUNDAMENTOJ DE LENINISMO.

### IMPORTANT

Car són molts els que volen posseir fotos com les que publi-  
quem en aquest número, preguem els interessats es serveixin es-  
criure a la nostra Redacció per tal d'enterar-nos quines i quantes  
fotos desitgen de les reproduïdes, a l'objecte d'encomanar-les al  
fotògraf de Vendrell.

El plaç d'admissió de comandes fineix el 30 de setembre prò-  
xim, i en el vinent número farem conèixer a cada un dels inte-  
ressats l'import de llur encàrrec.



## BIBLIOGRAFIO

RESPONDOJ AL EKSTERSOVETIAJ ATEISTOJ, de Em. Jaroslavskij. Moskvo, 1932. Eldonis: Centra Konsilantaro de Unio de Militantaj Ateistoj en USSR.

32-paĝa broŝuro, tre bone redaktita kaj presita, kiun oni legas kun streĉita intereso.

ESPERANTA TEKNIKA MEDICINA VORTARO, verkita de D-ro Briquet, el Lille. Eld. de "Internacia Medicina Revuo", 255, Av. du Longchamps, Bruxelles, 1932.

Libreto 359-paĝa, kun 3675 medicinaj terminoj. Verko vere giganta, pro kiu oni devas varme gratuli doktoron Briquet. Ĝi - certe estas unu el niaj plej bonaj fakaj vortaroj.

LA KONFLIKTOJ EN MANĈURIO KAJ ŜANHAJO. Pri la agado de U. H. A. en Ĉinujo. Kameoka, 1932. La agado de Universala Homama Asocio en Ĉinujo eble estis bona, sed tiu broŝuro 50-paĝa ne ŝanĝis nian opinion, ke en la Manĉuria afero pravas la ĉinoj kaj ne la japanoj.

DE INTERNATIONALE TAAL HET VRAAGSTUK EN ZIJN OPLOSSING. Broŝuro eldonita de Belga Esperanto-Instituto, Antwerpeno, 1932, enhavanta la konatan "Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia" kaj ĝian flandran tradukon de Willy de Schutter.

LA LANGUE INTERNATIONALE. LE PROBLEME ET SA SOLUTION. Sama eldono de B. E. I., sed kun franca traduko de Maur. Jaumotte.

ESSENZA E AVVENIRE DELL' IDEA D' UNA LINGUA INTERNAZIONALE. Itala traduko de "Esenco kaj estonteco...", farita de D-ro. P. C. Monti, kun tre lerta antaŭparolo kaj noto de Ing. Rinaldo Orenco. Dua eldono de "Riviste Italiana di Esperanto", Udine.

Ni vidis tradukojn de la dirita propagandilo en lingvoj angla, bulgara, flandra, franca kaj itala. Kiam ni havos katalunan tradukon?

ANNUAIRE 1932 DE LA S. F. p. l. p. d. E., Paris, 1932. Broŝuro 16-paĝa. Prezo: 1 franko.

ESPERANTLINGVA NOVELBIBLIOTEKO, redaktata de Leono Vienano. N-ro 1. "Eksiĝo", de Naum Jeruŝalmi. Traduko el la hebrea. Eld.: N. Szapiro, Varsovio. Interesa novelo kaj bonega traduko.



EL ESPERANTO EN 20 LECCIONES. De R. Inglada. Eldonis: C. Bermejo, Stma. Trinidad, 7. Madrid, 1931. Prezo: Pese-toj 2,50.

Broŝuro 112-paĝa. La plej bona Esperanto-lernolibro en hispana lingvo, kiun ni vidis ĝis nun. Ni kore gratulas samideanon Rafael Inglada, kiu, ni supozas, estas filo de la akademiano Vicente Inglada Ors.

VAGABONDO KAJ SINJORINO, de Walter Kloepffer. Romano tradukita el la germana lingvo de Ludwig Goppel. Broŝurita kaj duontole bindita. Amplekso: 204-paĝa. Formato: 20 cm. X 14 cm. Prezo por la bindita ekzemplero gmk. 4.40 kaj por la broŝurita gmk. 2.80. Eldonejo: "Heroldo de Esperanto", Brüssel Str. 94, Köln, Germanujo.

Tre bela eldono, en libra formo, de romano jam aperinta kiel felietono.

POL-POMERANIO, de K. Smogorzewski. El la franca trad. S. Grenkamp-Kornfeld. Kun 22 kartoj entekste kaj 4 plurkoloraj ekstertekste. Eld. "Esperantista Voĉo", Jaslo, Polujo.

S-o Kazimiro Smogorzewski, eminenta politika publicisto, aperigis tre interesan libron en franca lingvo st. *Poméranie polonaise*. Ŝajnis utile, ke tia grava verko pritraktanta tiom aktualan problemon aperu ankaŭ en esperanto. Tiel aperis mallongigo de tiu verko en la traduko de eminenta esperantisto S. Grenkamp; la libro fariĝas alirebla al ĉiuj sferoj, kiuj ne scipovas la francan lingvon.

En ĝi la aŭtoro resumas klare la historiajn, moralajn kaj ekonomiajn pravojn, sur kiuj bazis sin la Pac-Konferenco kaj kiuj decidis al redono de Pol-Pomeranio (pole: *Pomorze*), de tiu malnova pola marprovinco, al Polujo. Tiu ĉi solvo estis konforma al la volo de la loĝantoj, kies plimulto ĉiam estis pola kaj kiu atingas nun 91 %.

Dum la Pac-Konferenco ne nur Clemenceau, sed ankaŭ Prezidanto Wilson kaj Lloyd George konvinkigis, ke "libera kaj sekura aliro al la maro" por la pola ŝtato estas necesa, se ĝi devas resti sendependa kaj vivipova. La pola-germanaj limoj estis faritaj kun la plej granda prudento kaj justo. La fina decido okazis nur post longa 4-monata diskutado kaj ekspertado.

En tre kurioza ĉapitro la aŭtoro montras, ke en la mondo ekzistas pli ol dekkvar "Orientaj Prusioj" kaj pli ol dudek "koridoroj".

Estis ankaŭ necese demonstri la gravecon de la aliro al la maro por Polujo el ekonomia vidpunkto. La aŭtoro faras tion en tre detala ĉapitro.

Tiu objektiva ekspozicio de la aŭtoro, kiu apelacias al bonfidaj homoj per logika argumentado, ne povas lasi ilin sen favora impreso.



Estas klare, ke ne per senĉesaj nejustaj deziroj de reviziismo, kiuj forprenus de Polujo la esencan garantion de ĝia ekonomia kaj politika sendependado, sed per sincera kunlaboro al la plibonigo de la nuna kriza situacio kaj per morala malarmado, oni povos doni al Eŭropo kaj al tuta mondo la plej bonan garantion por la paco kaj prospero.

Post legado de tiu interesa libro, oni havas senton de simpatio al Polujo.

**DANCU, MARIONETOJ**, de Julio Baghy. Dua eldono.

Originalaj rakontoj, premiitaj de la Akademio. 176 dense presitaj paĝoj, 11. 5 x 15. 5 cm. Kun dukolora kovrilo. Broŝurita P. 3.80, tolbindita kun la portreto de la aŭtoro kaj faksimila letero de li P. S. Aldonu 10 % por sendkostoj. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝto, IX. Boráros tér 6.IV.11.

El ĉiuj noveloj de tiu volumo, la plej bona certe estas la unua; "Dancu, marionetoj", kiun timemaj spiritoj eble trovos malmorala. Sed en ĝi, kaj en la aliaj noveletoj, pulsas la granda koro de granda verkisto. La lingvaĵo de Baghy estas miriga. Ni devas riproĉi nur kelkajn nenecesajn neologismojn. Ekzemple, li skribas: Ne *darfas* fajfi, anstataŭ "ne *decas* fajfi", formo tute klara, klasika kaj taŭga.

**LINGUAPHONE CONVERSATIONAL COURSE-ENGLISH** kaj **VOBACULARI ANGLÉS-CATALA DEL CURS DE CONVERSA LINGUAPHONE ANGLÉS I 30 LLIÇONS DE GRAMÁTICA ANGLESA AMB LLISTA DELS VERBS IRREGULARS**, la lasta redaktita de nia agema samideano Delfí Dalmau, kiu certe faris la plej bonan lernolibron pri angla lingvo por katalunoj. Eldonis: The Linguaphone Institute, Barcelona, carrer de València, 245. Tiu Instituto, kiu instruas samtempe per gramofondiskoj kaj per libroj, eldonis kurson ankaŭ pri Esperanto.

**RAPORTO PRI LA AGADO DE U. E. A. DUM LA JARO 1931.** Broŝuro 74-paĝa, kun detalaj informoj pri la vivo de la grava asocio *por aplikado* de Esperanto.

**LERNOLIBRO DE ESPERANTA STENOGRAFIO, LAU LA SISTEMO DUPLOYE.** De P. Flageul. 4a aldono de Esp. St., 9, Boul. Voltaire, Issy-les-Moulineaux (Seine), Francujo. 16 paĝoj. 1,50 fr. frankoj.

**AMO PER PROVERBOJ**, unuakta komedio de A. Azevedo. El la portugala trad. A. Couto Fernandes. Dua aldono, 1932.

24 p. Pri la boneco kaj komikeco de la komedio atestas la favoraj recenzoj aperintaj okaze de la unua eldono.

**GVIDLIBRETO TRA KORTRIJK** (Belgujo). Eldonis la loka grupo. 20 p. kun belegaj ilustraĵoj.



NOVA NOMBRADO, jen la titolo de 16-paĝa broŝuro, eld. de A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italujo) pri nova sistemo prononci kaj reprezenti la nombrojn, elpensita de la italo Antonio Barbacetto.

SPERTO KAJ KONDUTO, de J. Krishnamurti. Eldonis: "Internacia Biokosma Asocio", Sollies-Pont (Var), Francujo, 1932. El la franca trad. Petro Stojan.

Broŝuro 22-paĝa, plena de altaj pensoj de la eks-ĉefo de la teozofoj. Ŝajnas, ke la nuna teozofio akcentas sian aspekton sciencon kaj iom forlasas sian aspekton religian.

PARIZAJ PAROLADOJ DE ABDUL BAHA, el la angla trad. Lidja Zamenhof. Baha Esperanto-Eldonejo, Weinheim (Baden), Germanujo, 1932.

Libro 103-paĝa, bonege presita de "Heroldo de Esperanto", kiun oni ĝue legas, eĉ se oni ne konsentas pri Bahaismo, pro la stilaj belaĵoj de la eminenta tradukintino. Tamen ni preferus, eĉ kelkaj punktoj, la formon *ata* super la formo *ita*. En la tuta libro ni trovis unu solan preseraron: *eferema*, anstataŭ *efemera*, en la paĝo 84.

ESPERANTO PER ESPERANTO, Lernolibro de la lingvo Esperanto laŭ senpera rekta metodo. Kun metoda enkonduko. Prilaboris Leono Vienano. Eldonejo N. Ŝapiro, Warszawa Nowolipki 8 Prezo zl. 1.75 au 0.20 dolaro. Pola poŝtĉekkonto, Warszawa 16.562.

La sistemon de tiu ĉi libro formas kvar jenaj postuloj pedagogiaj:

1) eblo de instruado laŭ senpera metodo (t. e. ne uzante tradukan ligvon) konformigita al plenkreskuloj sen iuj ajn iloj aŭ specialaj ilustraĵoj helpe de ordinaraj objektoj, kiuj troviĝas en preskaŭ ĉiu ĉambro, tono, simplaj movoj kaj gestoj.

2) por eviti la enuigan sistemon de apartaj frazoj ne interligitaj per iu komuna senco, troviĝas eĉ en la komencaj lecionoj facilegaj rakontoj, kies primitiva stilo respondas precize la gramatikajn kaj vortajn sciojn de la lernanto en koncerna leciono.

3) en ĉiu rakonto troviĝas nur tiaj formoj gramatikaj, kiajn la lernanto jam ekkonis en la antaŭaj lecionoj.

4) la gramatiko estas klarigata laŭ indukta metodo, t. e. el specialaj ĉapitroj gramatikaj la lernanto mem konkludas koncernajn regulojn.

El la kvar supre menciitaj punktoj de la sistemo oni povas facile konkludi ke la aŭtoro ne intencis sole pligrandigi la nombron da tiomaj lernolibroj kaj ĉiuspecaj memlerniloj sed kiel sperta pedagogo li prilaboris novan kaj originalan sistemon por instruado de la lingvo laŭ senpera metodo al plenkreskuloj.



## KLARIGO

En nia lasta numero, en "Bibliografio: Manifesto de la sennaciistoj", aperis la jena frazo: "ni estas aliĝintaj al SAT jam antaŭ malmultaj jaroj". Ĝi devas teksti: "ni estus aliĝintaj al SAT jam antaŭ multaj jaroj".

*Ni ricevis de kamarado Lanti la jenan leteron:*

Estas via rajto mallaŭde kritiki la "Manifeston de la Sennaciistoj", sed vi transpaŝas ties limojn, provante kredigi al viaj legantoj, ke: "en SAT estas sennaciista ja la tuto". Se vi estas nescia pri la celo k taskoj de nia asocio, vi bonvolu trovi ĉi-apude prospekton, per kiu vi povos esti ĝuste informita.

SAT, kies XIII-a Kongreso okazos en aŭgusto nunjare ĉe Stokholmo kun la morala k mona helpo de socialistaj k laboristaj organizoj el Svedio, estas malferma al ĉiuj tendencoj el la laborista movado k la sennaciismo estas nur unu el ili.

Opiniante, ke vi ne deziras konscie trompi viajn legantojn, mi esperas, ke vi bonvolos publikigi ĉi tiun leteron en la plej proksima n-ro de via gazeto.

Kun saluto.

*Por la Direkcio de S. A. T.: F. LANTI*

Ni ne komprenas la nuancon. Laŭ Lanti, ne ĉiuj anoj de SAT estas sennaciistaj: ili estas nur sennaciecaj.

Ĉar ni estas nur *internaciecaj*, ni ne povas tute partopreni la idearon de SAT, kvankam ni sentas al ĝi grandan simpatian. Ni katalunoj ne estas veraj naciistoj: nia naciismo bazas sur spiritaj aferoj, kiaj la Floraj Ludoj, popolmuziko, folkloro, renaskiĝinta lingvo, k. t. p. Sed malantaŭ ĝi ne estas kanonoj, militŝipoj, diplomatoj, k. t. p.

Amiko Lanti permesos al ni miri, ke unuiĝo de laboristoj aŭ klasbatalantoj ne estas alpreninta titolon pli signifoplenan: titolo "sennacieca" ne tute taugas por socialistoj, ĉar kapitalismo estas tio plej *sennacieca en la mondo*.—J. G. C.

## GRAVA ESPERANTA-FOLKLORA FESTO

La 4-an de Aŭgusto ŝipveturis Barcelonon grava karavano de folkloristoj de la "City Folklore Club" el Londono, kies prezidanto, Sro. S. Jackson Colman, kaj lia aŭstra edzino, S-ino. Schö-nau, estas tre konataj esperantistoj. Tiun karavanon akompanis aliaj geesperantistoj, anoj de la citita folkloro klubo.

Vespere, je la deka horo, estis dancataj de la kataluna folkloro societo "Esbart Català de Dansaires", dekdu konataj katalunaj



popoldancoj, muzike akompanataj de tipa kataluna orkestro "Cobla La Popular", havigita speciale por tiu festo de la Urbestro de Barcelona al la esperantistaj organizintoj, Sroj. F. Montserrat kaj D. Dalmau.

Krom tiuj popoldancoj, estis ankaŭ prelego de la estona s-ino. E. Pähn, tradukita anglen de S-ino. Schönau, klarigo en angla lingvo de Sro. Dalmau pri la signifo de ĉiu danco, kaj fine dank-saluto de la prezidanto de "City Floklore Club", kiu esprimis sin en angla lingvo kaj konstatis la rimarkindan interrilatigan valoron de Esperanto, sen kiu —li diris— ni ne estus povintaj ĝui tiujn momentojn de konatiĝo kun la vere interesaj popoldancoj de niaj katalunaj samideanoj.

## ENLANDA KRONIKO

*Barcelona.*—Okaze de la IV-a. datreveno de la fondiĝo de la grupo "Juneco", ĉi tiu grupo organizis kelkajn festojn. La 20-an de majo gesamideanoj F-ino. Maria Vila kaj s-ano. Ramón Fernández, ambaŭ anoj de la grupo "Paco kaj Amo", ludis en esperanto la teatraĵon de la konata kataluna dramisto Santiago Rosinyol "La ĉiama kantaĵo", kaj aliaj gesamideanoj de "Juneco" ludis en kataluna lingvo la komedion "La teta gallinaire". Post tio estis koncerto, pri kiu zorgis la tenoro Sro. Ricard Rue, kaj fine s-ano. Francesc Vilà deklamis kelkajn poeziojn. La morgaŭan tagon matene okazis Honora Vermuto, dum kiu la sekretario de la grupo, Sro. Rafael Gisbert, tostis kaj dediĉis la feston al la unuaj fondintoj de la grupo "Juneco". La prezidanto de KEF, Sro. S. Alberich, salutis per elokventaj vortoj la entuziasman grupon kaj admonis la direktantojn al daŭra laboro por nia komuna afero. Fine s-ano. F. Vilà dankis la vortojn de s-ano. R. Gisbert kaj finis sian belan paroladon deklamante la versaĵon de nia Majstro "Mia penso". La prezidanto de la grupo, s-ano. Antoni Callao, per dankaj vortoj fermis la agrablan feston.

Krom la anoj de "Juneco", ĉiuj festoj estis partoprenataj de multaj aliaj Barcelonaj esperantistoj.

—La grupo "Paco kaj Amo", en sia lasta ĝenerala kunveno, elektis la jenan estraron: Prezidanto, Joan Plana; Vicprezidanto, Angel Vidal; Sekretario, Sebastià Alberich; Vicsekretario, Ramon Fernández; Kasisto, Evarist Lapeira; Kalkulisto, Ricard Alberich; Bibliotekisto, Marcel Martinez; Voĉdonantoj: Ricard de Luna, Santiago Sala, Rodolf Fernández kaj Francesc Barril.

Inter la diversaj decidoj alprenitaj dum tiu kunveno, elstaras la okazigo de granda Esperanto-ekspozicio dum la ĉefa festo de Gràcia, la kvartalo de la grupo. Ankaŭ estos citinda la aranĝo de la festo por solenigi la datrevenon de la unua libro de Esperanto en la bela arbaro de Sardanyola.



—La grupo "Nova Sento" organizis Cseh-kurson dum la monato Junio, kiu estis partoprenata de pli ol 30 lernantoj. La 12-an de Julio, kiel adiaŭa kaj fina leciono, F-ino. Elinjo Pähn prelegis pri la naturaj belaĵoj de Estonio kaj Svedujo, kaj en la fino de sia interesa priskribo ŝi aŭdigis kelkajn gramofondiskojn kun gajaj melodioj de tiuj du landoj. Juna kursanino, F-ino. Roca, donacis al la lerta profesorino skatolon de bombonoj kaj subskribitan diplomon, kiel pruvon de dankemo de la ĉeestintaj gelernantoj.

—Ankaŭ dum la pasinta monato Junio okazis Cseh-kurso en la grava laborista kultursocieto "Polytechnicum" antaŭ malgranda rondo de entuziasmoj, kiuj partoprenis ĉiujn lecionojn kaj montris fortan intereson por starigi esperanto-fakon en tiu konata societo.

*Cassà de la Selva.*—Esperanto-rubrikon malfermis en siaj kolonoj la konata loka gazeto "Horitzó", kio certe multe helpas la tieajn esperantistojn, en ilia merita propagando por Esperanto. Okaze de la ĉefa festo de la urbo, tiu gazeto eldonis luksan kaj ampleksan eksterordinaran numeron, enhavantan artikolon pri la esperanto-movado.

*Manresa.*—Nia konata pioniro Sro. Albagés ricevis multajn gratulojn pro la atingitaj sukcesoj de lia juna filino Carme Albagés Busqueta en siaj finaj abiturientaj ekzamenoj. Bonvolu aldoni la estimata amiko nian gratulon al la multaj jam ricevitaj.

—Plensukcese finis Cseh-kurso partoprenita de 65 lernantoj. Ĉar la intereso por Esperanto estis tre fervora inter la kursintoj, oni aranĝis daŭrigan kurson, gviditan de la sama kaj konata profesorino Pähn.

*Vic.*—La 23-an de Aprilo geedziĝis niaj karaj geamikoj Sro. Vicenç Serra kaj F-ino. Conxita Rierola, ambaŭ el Vic. Al la simpatia paro ni sendas koran gratulon kaj deziras nefinotan mielunon.

—La nunan estraron de la ĵus fondita "Esperanta Grupo" konsistigas la jenaj gesamideanoj: Prezidanto, Josep Pratdesaba; Vicprezidanto, Jacint Comella; Sekretario, Ferran Dou; Vicsekretariino, F-ino. Lluïsa Castells; kasistino S-ino. Dolors C. de Duran; Kalkulisto, Miquel Parareda; Bibliotekistino, F-ino. Teresa Cunill; Voĉdonantoj, F-inoj. Maria Albanell, Margarita Planas kaj Sroj. Jaume Pujals, Lluï Pous.

—La 14-an de Junio oni aranĝis vespere en nia grupo kolektivian aŭskultadon de la prelego kaj koncerto senditaj de la polaj radiostacioj. Malgraŭ la malbonaj nuntempaj admosferaj kondiĉoj la aŭdado estis sufiĉe kontentiga, kaj la 50 ĉeestintoj plezure aŭskultis la esperantan paroladon kaj koncerton, venintaj el tiom malproksima lando (J. C.)